

Peter A. Kraus :

**Eŭropa publikeco kaj lingvopolitiko
- Integriĝo per agnosko -**

germanlingva titolo:

*Europäische Öffentlichkeit und Sprachpolitik
- Integration durch Anerkennung -*

La libro „Eŭropa publikeco kaj lingvopolitiko -Integriĝo per agnosko-“ de *Peter A. Kraus* publikigis en 2004 pere de eldonejo *Campus-Verlag, Frankfurt / New York*, kiel volumo 53 el la serio „*Theorie und Gesellschaft*“ (Teorio kaj socio), eldonita de *Axel Honneth, Hans Joas, Claus Offe* (kiu ankaŭ verkis la antaŭparolon) kaj *Peter Wagner*; 232 p. ISBN 3-593-37491-9; 22,5 cm, prezo 27,10 €.

La aŭtoro, naskiĝinta 1960 en Barcelono, diplomigis 1988 pri sociologio (univ. *Bielefeld*). Li doktoriĝis en 1994 pri politik-scienca (univ. *Frankfurt/M.*) kaj habilitiĝis en 2003 ĉe *Humboldt*-universitato en Berlino, kie li ekde julio 2003 instruas kiel privat-docento politik-sciencon.

Aliaj publikigaĵoj de la aŭtoro kun prilingvaj titoloj:

– „*Kultureller Pluralismus und politische Integration: Die Sprachenfrage in Europa*“ (Kultura plurismo kaj politika Integriĝo: la lingva demando en Eŭropa) en *Österreichische Zeitschrift für Politikwissenschaft*, 4/1998; p. 443-458.

– „*Political Unity and Linguistic Diversity in Europe*“ (Politika unueco kaj lingva diverseco en Eŭropo) en *Archives Europæennes de Sociologie / European Journal of Sociology*, XLI, 1,2000, p.138-163.

– „*Grenzen der politischen Kommunikation und die Sprachenfrage in der Europäischen Union*“ (Limoj de politika komunikado kaj la lingva demando en EU) en *Berliner Debatte Initial* 5/2000, p. 5-14., 2002.

Malgraŭ la titolo kaj malgraŭ la teksto sur la ekstera kovraĵo la libro ne prezentiĝas nur-prilingva aŭ lingvistika verko. Ĝia enhavo montriĝas plejparte politikscienca (rigardu sube la enhavo-tabelon).

La libro ampleksas 7 ĉapitrojn kun ĝis 7 subĉapitroj (redonitaj nur por ĉapitroj 4 – 6) kaj antaŭparolon (traduko kaj dikliterumo de la recenzisto):

Antaŭparolo de *Claus Offe* (unu el la eldonantoj)

1. Enkonduko: la dinamiko de la eŭropa integriĝoproceso
2. La demokratia deficiito en EU kaj la serĉado pri eŭropa *demokratia*
3. La problemaro de eŭropa identeco kaj la “multpopola konstelacio”
4. Lingvo kaj politiko: defio por Eŭropo
 - 4.1 La socia kaj politika ligilo de la lingvo
 - 4.2 La verdikto de *John Stuart Mill*
 - 4.3 La lingvopolitiko de la eŭropaj ŝtatoj
 - 4.4 De la lingva multobleco al la demando de agnoskado
 - 4.5 Aktualaj tendencoj: lingvo kaj protekto de minoritatoj kuntekste de la eŭropa ĉarto pri homaj rajtoj
5. La lingva demando en la institucia strukturo de EU
 - 5.1 La institucia pado al plurlingveco
 - 5.2 Oficiala kaj reala multlingveco
 - 5.3 La politigo de la lingva demando
 - 5.4 La diskuto pri reformo de la institucia lingvo-reguligo
6. Politika komunikado en la transnacia civitana socio
 - 6.1 Konstitucio, publikeco, lingvo
 - 6.2 Politika komunikado en la kunteksto de plurlingveco
 - 6.3 La lingvo-mondo de la eŭropanoj kaj la aleksteraj lingvopolitiko de EU
 - 6.4 Elirvojo interreto?
 - 6.5 Kiu lingvo por eŭropa civitana socio?
 - 6.6 La politika opcio por konverĝa multlingveco
7. Agnosko, memdecido kaj Integriĝo en eŭropa multpopola socio

La ĉefa impulso de la aŭtoro por verki sian libron evidente ne estas lingva demando. Tiu ĉi servas al *Kraus* proprakonfese kiel ekzemplo por pritrakti la problemon de la kultura diverseco en EU (p.24).

Kerno de la libro estas kontribuo por la antaŭenigo de la eŭropa integriĝo-proceso post la kontraktoj de *Maastricht* (1992) kaj tiu de *Nice* (2000). Li skizas la du ĉefajn polusojn, ĉirkaŭ kiuj turniĝas la diskutoj rilate la politikan estontecon de la Unio.

Kiel reprezentantojn de la diversaj opinioj li prezentas la tiaman germanan ministron pri eksteraj aferoj, *Joschka Fischer*, kaj la tiaman francan ministron pri internaj aferoj, *Jean-Pierre Chevènement*. Dum *Fischer* postulas “la transiron de la ligo de ŝtatoj al plena parlament-bazita eŭropa federacio” (p.29), *Chevènement* kontraŭe vidas la union ĉefe kiel nuran politikan ligan de naciaj ŝtatoj (p.30). *Kraus* mem pledas por transnacia politika ordo por Eŭropo, do tendencas al federacio, sed li samtempe vidas obstaklan dilemon, nome ke ankorau ne ekzistas eŭropa civitanaro pro manko de komuna eŭropa identeco de la enloĝantoj. Tiuj ĉi identiĝas surbaze de siaj nacioj,

heterogenaj kulturoj kaj propraj lingvoj. Sekve en ĉiu unuopa ŝtato ekzistas publikeco, sed mankas eŭropa publiko, eŭropa publikeco, pere de kiu povus estiĝi eŭropa identeco. Laŭ li la granda defio por eŭropa konstitucio signifas, evolui adekvatajn manierojn por la agnosko de la diverseco kaj por la traktado de la heterogeneco de la eŭropa civitanaro (p.24).

Elektante la eŭropan lingvo-politikon por pritrakti la problemon de la heterogeneco de EU, li kritikis la Union pro tio, ke ĝi neas aŭ evitas diskuti la lingvo-problemon, esperante ke la tempo solvos la demandon por ili. Li avertas serĉi solvon lasante la terenon al la lingvo-merkato, ĉar tio neeviteble kondukos al nur-angla Eŭropo. Laŭ li estas erare, konsideri la eŭropan version de “*global English*” kiel esprimon de interkonsentita volo de la popola komunumo.

Kraus listigas kvar kaŭzojn, kial la angla ne taŭgas kiel “ora vojo” al komunika integriĝo (p.193-197):

- la angla ne estas justa solvo, ĉar ne neŭtrala;
- politikaj konotacioj algluiĝas al la angla lingvo; ĝi dankas sian pozicion ne al lingvaj avantaĝoj, sed al la politikaj kaj ekonomiaj potencrilatoj;
- la “nuda” instrumenteca karaktero de la angla malfaciligus evolui la esprimivan flankon de lingva komunikado;
- “nur-angla” kunportus lingvo-kulturan konfliktpotencialon.

Tamen li avertas “demonigi” la anglan kaj ĝian potencialon kiel eŭropa *lingua franca*. Oni ankaŭ ne povus atendi “*ke EU donkiliote batalu kontraŭ la angla*” (p.198). EU do senreserve inkluzivigu la anglan, sed *laŭeble* ankaŭ aliajn lingvojn (kursivigo de la recenzisto). La Unio do havigu al si la celon, antaŭenigi plurlingvecon montrante trans la anglan. Kiuj lingvo-kombinoj estus preferindaj, tio ne laste dependus de socikultura kunteksto-faktoroj (p.198).

Kraus koncedas, ke la plej eleganta kaj plej honesta solvo de la lingvoproblemo “eble” konsistas en tio, serĉi komunan “interkompreniĝ-vehiklon” kun grandaparte neŭtrala karaktero. Varianto eble povus ankaŭ esti vidata en la transpreno de iu plej malgranda kaj marĝena eŭropa lingvo. La revivigon de la latina li taksas same maltaŭga kiel ankaŭ iujn spekulativajn pripensojn rilate al “artefaritaj lingvoj kiel Esperanto kaj Volapuko” (p.191).

Sen plia argumentado *Kraus* trairas al propra propono favorante t.n. “konverĝantan multlingvecon”, laŭ li: “modelon sub konverĝanta multlingveco mi komprenas modelon, kiu – ĉe dividitaj komunikado-koneksoj – klopodas, kunduki kaj respektadon de diverseco kaj prag-

matismen en necese dileman ekvilibron” (p.198). Pli da klareco la leganto ne ricevas pri lia propono. *Kraus* daŭrigas same nekonkrete: “Pro la ankoraŭ grava signifo de politikaj identecoj, kiuj estas malvaste interplektitaj kun la kulturaj kaj lingvaj vivomondo partikularaj, EU “nuntempe” apenaŭ povas eviti agi per maksimumo de multlingva delikatsentemo” (p.198).

Kaj: estonte koncipendus eŭropa lingvovehiklo, taŭga por malmunti kompreno-barojn pere de parte sin kovrantaj komunikaj repertuaroj (p.198). Li havas la vizon de eŭropa mapo, sur kiu estiĝas amasiĝoj (“*Cluster*”) de landoj kaj regionoj, kiuj montras lingvaj kaj kulturajn afinecojn. Tiamaniere oni laŭ *Kraus* en la EU (de 15 membroj) povus spekulativi pri la estiĝo de “latina”, “norda”, “teŭtona” kaj de “atlantika” retsimilaj konektoj. Ene de tiaj retajtoj supozeble en multaj okazoj la lingva parencoco permesus uzi la t.n. “pasivan du-lingvecon”, t.e. ke ĉiu komunikanto uzas sian gepatran lingvon kaj pli aŭ malpli bone komprenas la mesaĝon de la alia en la al li fremda lingvo. Por substreki la taŭgecon de tiu propono, *Kraus* referencas al *Joseph M. Colmer* (“*La utilitat del bilingüisme, Barcelona: edicions 62, 1996*”) laŭ kiu – en medio kun kvar parolataj lingvoj – du hazarde elektitaj personoj malsamlingvaj trovas “komunan lingvon” kun 78% probableco, kondiĉe ke ambaŭ parolas du lingvojn. En medio kun 10 lingvoj la probableco laŭdire montriĝas 89%, se la interparolantoj parolas almenaŭ 3 lingvojn inkluzive de la gepatra (p.199).

Kaj kio valorus en medio kun 21 lingvoj? Mi tion ne kapablas kalkuli, sed timas, ke en EU kun 25 membroŝtatoj tiu pasiva plurlingveco ne estas sufiĉe taŭga rimedo por “komunikado” kiu meritas tian nomon.

La politiksciencan valoron de la libro mi ne kapablas pritaksi. Sed la kontribuo de *Kraus* al la diskuto pri la lingva dilemo en EU estas magra. Laŭ mi la tiurilate sola valoro de la verko videblas en tio, ke la aŭtoro trafe skizas la lingvan problemon, prave postulas lingvopolitikon flanke de EU kaj ke li, avertante daŭrigi la “ne-politikon”, emfazas la neceson, komenci politike malferman diskuton pri la lingvodemando: vere plia voĉo kontraŭ la siĝteno “daŭrigo kiel kutime!” Sed liaj proponoj superi la nunan dilemon, nome la de li favorata *konverĝanta multlingveco* restas nebuleca kaj svaga.

Mi provas resumi: li postulas de EU, ke ĝi subtenu konsekvence lingvoinstruadon kaj plurlingvecon en la unuopaj ŝtatoj kiel esencan parton de politika eduko kaj klerigo. Supozeble tiamaniere kreigu la tereno, sur kiu estiĝos tiaj regionaj “kvar retajtoj” (“latina”, “teŭtona”,

“norda” kaj “atlantika” amasiĝoj), inter kiuj regu lingvo-kultura proksimeco. Ĝi permesus pasivan dulingvecon ene de la koncernaj retoj. Kaj kio ekster la retajtoj? Verkante la libron *Kraus* devis esti konscia pri tio, ke EU survojas al 25-ŝtata estaĵo. Mi ne bone vidas, kiamaniere en plivastiĝinta Eŭropa Unio liaj proponoj povas konduki al kontentigaj rezultoj.

Fakte li ne sukcesis, forlasi la plej ofte uzitajn padojn: la maniero diskuti pri neŭtralaj lingvovehikloj restas nesufiĉa, des pli ĉar li taksas ilin la “eble plej elegantan kaj honestan solvon” (p.190, 191). En malpli ol unu paĝo la aŭtoro mencias la proponon revivigi la latinan kaj la ideon akcepti planlingvon (laŭaŭtoro: “artefarita lingvo”). Anstataŭ argumenti pro aŭ kontraŭ, li simple referas ekz. ke en 1974 du EU-parlamentanoj, *Patijn* kaj *Van der Hek*, estis proponintaj revivigi la latinan kiel neŭtralan kaj tradiciriĉan pontolingvon. Senkomente li raportas la komisionan nefavoran respondon. Kaj: “*Krom ‘mortaj’ lingvoj de tempo al tempo ankaŭ artefaritaj lingvoj kiel Esperanto kaj Volapuko estas objektoj de spekulativaj pripensoj pri tio, kiamaniere eŭropa lingvotereno povus esti kreata en justa maniero. Al la movado de la Esperantistoj EU fakte ŝajnas esti ideala kadro, por povi realigi la propran utopion. Iliaj vizioj tamen ĝis nun ne vekis reciprokajn simpatiojn en la eŭropaj institucioj*”; kaj plue: “*Sed estas apenaŭ kontesteble, ke laŭ la mezuriloj de realproksimeco kaj de pragmatismo nek respektinda malnova lingvo kiel la latina nek ‘celtrafaj’ artefaritaj lingvoj kiel Esperanto montriĝas sukcesaj kandidatoj*” (p.191).

Jen montriĝas, ke la verko “Eŭropa publikeco kaj lingvopolitiko” ne originas el la plumo de lingvisto. De lingvofakulo oni ja rajtas atendi, ke li prezentas la *nunan staton de la eŭropa lingva debato*, subtenas ekzistantan proponon per propraj argumentoj aŭ dismetas proprajn ideojn, ne nur nubecajn. *Kraus* resumas (p.199), “ke EU apenaŭ sukcesos kvadratiĝi la lingvan cirkon”, kaj per tio li malkaŝe rezigne koncedas, ke li mem ankaŭ ne vidas solvon. Al tio konformas lia konkludo, ke fine estus pli grave, kiamaniere EU sukcesos starigi komunikadregulojn ol *kiajn*, se nur la eŭropaj popoloj kaj civitanoj havus la eblecon aktive kunkrei la transnacion komunikadteron, (p. 200). Sonas kvazaŭ, ke la rezulto egalus, se nur ĉiuj estus kontentaj. Kiu volas ricevi *superrigardon pri la eŭropa lingvoproblemo*, pri la *nunaj* debatoj kaj proponoj, tiu elektu alian verkon.

Recenzo de

Horst VOGT, Teurerweg 92, DE-74523 Schwäbisch Hall / Germanio

Legantaleturo

Ĉu iu el niaj scienco-kapoj scias solvojn?

Facillingvaj scienc-resumoj vere utilis por la multaj ĉinaj komencantoj renkontitaj en Pekino. Ĉu el "Scienca Revuo" al "Kontakto" de TEJO? Kion pri aŭtoraj rajtoj? Mi foje komencis noti la sciencaĵojn de Biblioteko *Hodler* en Roterdamo. Se foje mi havus tempon... Sed brulas alia afero: Unu uragano post alia teruras la Kariban regionon. Se oni ja sciopovas estingi nafto-putojn (la iniciatoro ĵus forpasis), kial ne eblus kontraŭi la trofortiĝon de uraganoj en stadio ankoraŭ traktebla? Ĉu alvoki niajn teknikistojn okupiĝi pri pacaj armiloj anstataŭ militaj? Necesus eksperimenti laboratorie, por ke la "sorĉist-lernantoj" ne obligu la danĝeron translokante ĝin.

Kompreneble, sub federacia mondregistaro tiaj alvokoj havus pli da ŝanco. Certe ĝi devos energie rearbarigi en multaj landoj, kiel nun Haitio spertis ekstraĵajn katastrofojn pro seniĝo de arbaroj. Tia mondregistaro ankaŭ zorgus pri justa labordivido ĉe rekonstruado, inkluzive de justaj enspezoj. Ke ne ripetiĝu la profitemo pri Irako. Plua demando: ĉu tra la ozontruo la suno pli varmigas ter- kaj marsurfacojn aŭ, male, ĉu la forceja efiko de nia atmosferpoluo kontribuas al la nekutime fortaj uraganoj plagantaj novaĵtamburajn kaj malpli atentatajn regionojn?

Ĉu oni jam eksperimentas estingi naskiĝantajn „bebo-ciklonojn“ (1-a PIV-signifo) kvazaŭ brulegantajn naftoputojn? Mi pensas ankaŭ pri iaj kolosaj sunombreloj aŭ kungrupigo de satelitoj por malpliigi la radiadan efikon de nia suno. Aŭ ĉu ĝuste tiuj jamaj satelitoj, raketoj k.s. efikas malfavore? Entute, kiel ni povas „polvosuĉi“ la atmosferon, tropoluatan ankaŭ de aviado? Ĉu iu el niaj scienco-kapoj scias solvojn?

“Ne paniku”, oni diras. Tamen konsternis sciencaĵo en mia ĵurnalo *NRC-Handelsblad*, ke ĝuste arboj kaj plantoj produktas vivdanĝere tro da metano, pli malutila eĉ ol karbondioksido. La efikon rapidigas la ĝenerala temperaturkresko. Do, mi konkludas ke tiu evoluo pasis la krizo-limon kaj ne estas inversigebla. Kion do pri nia oksigenbezono? Ĉu bredi oksigenproduktajn bakteriojn? Aŭ ĉu ĉi tio estas falsaĵo por pravigi lignokomercistojn? Pseŭdoscienco ja ankaŭ servis al tabakistoj. Fine, ĉu nia tekniko kapablas reekvilibrigi la ozontavolon en la plej altaj sferoj? Mi daŭre esperas, ke iu el niaj ekspertoj scias saĝan respondon.

Rob MOERBEEK

Zwaansmeerstraat 48

NL – 1946 AE Beverwyk / NEDERLANDO

* **Redakta rimarko:** Ni ne balastiĝu pri “aŭtoraj rajtoj” – ĉiu rajtas kopii aŭ aliloke publikigi artikolon aŭ alian enhavon de Scienca Revuo sub nura kondiĉo, ke la sciencrevua fonto estu klare citita.